# nia voĉo

**madrida esperanto-liceo majo 2021**

## LA RETA RENKONTIĜO, ĈIMONATE EN LA FESTO DE LA REGIONO

La 2-a de majo estas la oficiala Festo de la Regiono de Madrido. Pro tio, en tiu tago ni okazigos la monatan rendevuon de la Madrida klubo (kiu okazas kutime en sabato, sed ĉikaze escepte en dimanĉo), denove virtuale, ekde la 18,00 horo.

Ni diskutos pri la signifo de la festo kaj de la regiono mem kaj pri la aktualeco en la regiono. La 4an de marto okazos en Madrido regionaj balotoj, por elekti novan parlamenton kaj prezidanton de la regiono, do eble pri tio oni povos paroli ankaŭ (kun modero)

Ni plu utiligas la sistemon Jitsi, en la adreso https://meet.jit.si/MadridaSabataRenkonto.

La invito plu restas malferma ankaŭ por ne-madridanoj, kaj en tiu ĉi okazo eĉ pli! Ĉiu estas bonvena.

## PLILONGIGITA LA ALIĜPERIODO AL LA VIRTUALA KURSO

Oni anoncis la plilongigon ĝis la 2a de majo de la aliĝperiodo al la virtuala kurso organizita de Esperanto Colombia, pri kiu ni informis en la pasinta numero.

La kurso konsistos el 16 sesioj de du horoj, po du semajne inter la 19a de majo kaj la 10a de julio. Unu el la horaroj estos taŭga por lernantoj en Hispanio: merkrede kaj sabate inter la 19:00 kaj la 21:00, hispana horo.

Bonvolu diskonigi. Pliajn detalojn eblas legi en: https://www.esperanto.es/hef/index.php/438 (en la hispana) kaj en la Gazetara Komuniko de UEA: https://uea.org/gk/948a1.

Memoru ke ni ankoraŭ bezonas instruistojn. Ili ricevos modestan kompenson pro la tasko. Bv kontakti kun la Hispana Esperanto-Federacio ĉe: admin@esperanto.es se vi pretas kunlabori.




## POR PLIAJ INFORMOJ

Memoru ke Madrida Esperanto-Liceo malfermis konton en la socia retejo Tŭitero (Twitter). Vi povas trovi nin ĉe: https://twitter.com/LiceoMadrida. Sekvu kaj abonu ĝin por scii pli pri niaj agadoj kaj renkontoj.

Por novaĵoj en Madrido, vizitu regule la retejon de MEL http://www.esperanto.es/mel, kaj la retliston https://groups.google.com/g/esperanto_madride/.

En *Fejsbuko* vizitindas la forumo de MEL: https://www.facebook.com/esperanto.madrid/ aŭ la pli ĝenerala https://www.facebook.com/groups/esperanto.madrid/.

Por informiĝi pri aliaj tutmondaj agadoj virtualaj, vizitu la retejon https://eventaservo.org/.


madrida esperanto-liceo

Rodríguez San Pedro 13-3º-7. 28015 Madrid

http://www.esperanto.es/mel/ madrid@esperanto.es

Redaktas Toño del Barrio Komentojn kaj informojn sendu al niavocho@gmail.com